


trimestriel
4ème trimestre

N° 156
31 décembre
2011

LA INFORMILO



l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
« Philippe Desforges »
27, Rue de la République
FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara
15 €
Eksterlando
18 €

Prosélytes ... et solidaires !



Le week-end du 17/18 novembre 2011, " Mulhouse-Espéranto " avait dressé un stand au **Salon du commerce équitable de UNGERSHEIM (68)**. Une autre équipe du club était à l'œuvre au siège de l'association, à l'Éspace 110, où se tenait le **Festival Bédéciné**.

Les bandes dessinées en espéranto y trouvent toujours des amateurs, la plupart du temps des collectionneurs.

Ces deux actions de promotion ont bien sûr permis de récolter des signatures pour la campagne "L'espéranto au baccalauréat". Il est également possible de signer sur le site

www.esperanto-au-bac.fr



Heureuse et fructueuse année 2012 à nos fidèles lecteurs !

Esperanto France-Est**esperanto**
France-Est**Orient-Franca**
Esperanto-Asocio.**La Informilo**Bulletin bilingue d'information sur la
langue internationale **ESPERANTO**Dulingva inform-bulteno pri la
internacia lingvo **ESPERANTO****Rédaction:**
Redaktoro:**Pol DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC**
poŝ-tel. 06 98 09 62 81

pol.denis@orange.fr

Les articles à insérer doivent
parvenir impérativement à la
rédaction dans les délais suivants:Article manuscrit
Texte envoyé par courriel
Document avec mise en pageun mois
3 semaines
2 semainesavant la fin de chaque
trimestre

Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.

Komitato de la Asocio**Comité de l'Association**

Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro Pol DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06 34 33 68 93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alain COLLIGNON	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

Abono al La Informilo →

Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj

← **Abonnement à La Informilo**

Pagoj per ĉeko je la nomo de →

Esperanto France-Est← **Paiement par chèque au nom de**

Pagoj per ĝiro al jena konto →

CCP 1997 72 W NANCY← **Paiement par virement au compte**Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto
Adres-ŝanĝo: Informu al →S-ro André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIMChèque bancaire ou postal ou changement
← d'adresse à envoyer au trésorier

sommaire

1 Page frontale	17 Alexandrs les Vosges
2 Ours	18 UEA
3 Edito	19 Chinois et commerce
4 Congrès national 2012	20 Vidéos - Eo insulo
5 Hommage Odette	21 Vinilkosmo
6 Hommage Odette (2)	22 Vinilkosmo (2)
7 Stage la « Petite Pierre	23 Carnets Dang Thuy T.
8 Stage la « Petite Pierre (2)	24 Memo Lucien Péraire
9 Info Nilvange et OSIEK	25 Carpette anglaise
10 Rapport Magrat de Mar	26 La nokto
11 Rapport Magrat de Mar (2)	27 Libroservo
12 Rapport Lublin (JLT)	28 cotsations
13 Rapport Lublin (JLT -2)	29 cotsations (2)
14 Memore al ... - ĉu enretigo ?	30 anecdotas
15 Zamenhof-festo « trilanda »	31 page détente
16 Sterefonio - kanti en E*- Troyes	32 photothèque

ISSN 0291 6037 trimestriel

N° CPPAP : 0409 G 83517

bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle**Esperanto France-Est**MJC Philippe DEFORGES - 27 rue de la République
54000 NANCYDirecteur de la publication : **Edmond LUDWIG**Rédacteur : **Pol DENIS**

dépôt légal : 31 décembre 2011

imprimé par l'imprimerie de l'encre
55000 Hargeville-sur-Chée

Estimatif gesamideanoj,



En ĉi-angulo mi ŝatus insisti pri la graveco de aliĝoj al niaj asocioj, de abonoj al nia revuaro, de aĉetado de niaj libroj. Kiu reprezentos nin ĉe la aŭtoritatoj, se ni ne estas organizataj en asocioj ? Kiu konsideros nin seriozaj, se ni ne montras, ke ni ekzistas en la reala mondo, ke ni vivas kaj komunikas trans la limoj, ke ni estas kultura movado ? Eble vi ne havas tempon por aktivi, eble vi ne plu havas la fortojn necesajn por aktivi, sed montru al ni vian persistan deziron helpi al Esperanto per viaj aliĝoj kaj abonoj.

Ĉion necesan vi trovos en tiu ĉi numero de LA INFORMILO .

Eble ankaŭ viaj geamikoj deziras subteni nin !!! Informu ilin ! Antaŭdankon pro via helpo... kaj pasigu agrablajn festotagojn !

Feliĉon kaj sanon por la Nova Jaro !

Edmond LUDWIG



Dans ce bulletin : votre fiche d'adhésion à notre rencontre culturelle internationale de « printemps » !

Centre de vacances *Ambroise Croizat* - LA PETITE PIERRE (67290)

23 / 24 / 25 mars 2012

votre fiche d'adhésion (document annexe) au 97^{ème} Congrès Universel d'Espéranto

Hanoï - 28 juillet / 4 août 2012

pour vous initier à la seule

vraie langue internationale

pour vous perfectionner

ou éprouver le plaisir rare de converser

en espéranto !...

pour profiter

de nos stages, de nos rencontres,
de nos congrès, de nos voyages ...



"☆☆☆?...
-☆☆!"



la solution ...
un cours personnalisé
chez soi !

*rapidité...
efficacité...
deux maître-mots
de notre cours
par correspondance !*

- ☆ un matériel adapté
- ☆ une technique éprouvée
- ☆ un réseau d'animateurs performants
- ☆ un savoir immédiatement opérationnel



Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR

*une diffusion
sur toute la région
et au-delà !*



information : 03 89 77 52 55

à consulter !

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...
et sur l'Espéranto en général !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.

Notre rubrique "*albums photos*", complétée en permanence, vous offrira un panorama exhaustif original des événements régionaux et ... extérieurs !

une visite s'impose !

**Bienvenue
à St-Aignan
de Grand
Lieu !**

DU 25 AU 29 MAI 2012 À ST-AIGNAN DE GRAND LIEU (44)

Congrès 2012 de l'espéranto en France



Bienvenue en Loire Atlantique !

Le Congrès 2012 de l'espéranto en France aura lieu du 25 au 29 mai 2012 à Saint-Aignan de Grand Lieu, à proximité de la métropole nantaise.

C'est le château de la Plinguetière (photo ci-contre) qui accueillera le congrès.



Au programme, en plus des réunions statutaires des associations participantes, des conférences, des ateliers, des spectacles et des excursions, comme la visite de Saint-Aignan, la découverte du lac et de Saint-Philbert, la visite de Nantes, une promenade en bateau sur l'Erdre...



Réservez dès maintenant ces dates dans votre agenda !

**esperanto
France**

4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS • à 50 m du Métro Bastille
Tel. 09 51 77 18 33 (tarif local) • info@esperanto-france.org



Al niaj legantoj ...

En *LA INFORMILO N°155*, ni mallonge anoncis la forpason de Odette SCHEIDEL, sed pro tuja presado, ne plu restis tempo por rememorigi al niaj gelegantoj la modelan agadon de nia Esperanto-avinjo.

La forpaso de Odette afliktis multajn inter ni...

Jen eltiraĵoj el retmesaĝo de Ginette MARTIN

" La anonco de ŝia morto iom surprizis min, ĉar antaŭ nelonge mi ricevis leteron de ŝi, responde al mia poŝtkarto de Kopenhago. Kaj la letero estis en Esperanto ! Ŝi plurfoje ripetis, ke ŝi aĝas preskaŭ 90 jarojn kaj ke ŝi ne plu vidas bone. Tamen ŝi trovis energion por plenigi la du flankojn de la paĝo, skribi tre klare mian adreson, glui la poŝtmarkon kaj iri ĝis la poŝtofiĉejo.

Ŝi estis tia, mia kara Odette, nia kara avinjo! Ŝi estis kaj restas mia modelo. Ŝi ne volis malĝojigi la homojn, kaj ripetis plurfoje en sia lasta letero "*Ridu, ridu*".

Mi estas kontenta, ke ŝi povis zorgi pri si ĝis la fino. Mi estas ĝoja, ke mi povis elŭti la fotojn de ŝi el la retejo de la Strasburga klubo "



G.M.

Alia kortuŝa mesaĝo venis de Renée TRIOLLE :

" Kun granda emocio, mi legis pri la forpaso de Odette Scheidel . Se ĉiu esperanto-parolanto estus tiom entreprenema, imagplena kaj laborema kiel ŝi !

Mi memoras, kiom da ludoj ŝi inventis kaj fabrikis por instrui al infanoj . Mi ankaŭ ne forgesas, kiom da bongustaj tortoj ŝi preparis por akcepti la ekskursantojn post *kongreso de Esperanto-France* antaŭ 9 jaroj . (La saman tagon, naskiĝis mia nevino *Tania*. Kiam mi informis Odette, ŝi tuj sendis manfaritan salutkarton, pri kiuj ŝi famiĝis kaj manfaris malgraŭ problemo ĉe la fingroj !)

Do, adiaŭ, kara amikino".

R.T.

Saman portreton ni retrovas en la adiaŭa letero de nia prezidanto, dum la entombiga ceremonio en la preĝejo najbare de ŝia domo, kie oficas kaj katolikoj, kaj protestantoj.

Ĉeestis kun la familio gesamideanoj de la departementoj Bas-Rhin kaj Haut-Rhin, de Nancy, kaj multaj loĝantoj, inkluzive de lokaj ekslernantoj.

Belege kantis en Esperanto la preĝeja koruso gvidata de Sinjorino SCHMITTER, « *Patro nia* » laŭ muziko de Rimski KORSAKOV.

" *Chère Odette, notre grand-mère Espéranto,*

Vous nous quittez pour toujours, mais je souhaite, devant cette assemblée, vous lire cette dernière lettre pour vous remercier de tout notre cœur pour l'immense somme de travail que vous avez fournie en une trentaine d'années.

Lors de votre départ à la retraite vous aviez décidé d'apprendre la Langue Internationale par correspondance, et très rapidement vous avez contacté notre association, en espéranto, pour participer à des stages de fin de semaine et... pour passer toute la série des examens de *l'Institut Français d'Espéranto* pour pouvoir enseigner la langue.

Et ce fut là le début d'un engagement ininterrompu au service de l'espéranto et de ses locuteurs.

Rappelons :

- l'enseignement de la langue à Betschdorf,
- les corrections de devoirs pour notre cours par correspondance,
- les corrections de devoirs pour de nombreux élèves africains,
- l'enseignement de la langue aux enfants, et vous avez vous-même fabriqué le matériel pédagogique approprié comme une professionnelle...

- l'organisation de stages régionaux à Betschdorf et à *Haguenau* ... et une grippe ne vous arrêta pas !!!

Vous avez été la première à faire collaborer des associations concurrentes lors d'un congrès organisé par vos soins à *Mittelwihr*. Rappelons que de plus en plus souvent, ces associations organisent des congrès communs et des actions communes.



Et tout ceci vous le faisiez avec plaisir, gratuitement, avec un dévouement infini...

... Vous avez hébergé et régalaé avec vos délicieuses tartes aux fruits ou vos tartes flambées, des espérantophones de passage de tous les coins du monde, des espérantophones de la région, des européens, des africains, des japonais. La couleur de la peau, leur religion ne vous importaient pas, pour vous, c'étaient des êtres humains et grâce à cette langue où chacun fait la moitié du chemin vers l'autre, vous étiez à l'écoute des autres cultures ! Et chacun repartait *de cette maison alsacienne du 35, Grand'rué* comme ambassadeur de Betschdorf et dans les rencontres d'espérantophones, Odette Scheidel, c'était Betschdorf, et Betschdorf, c'était Odette SCHEIDEL !

Mais si je vous avais lu cette lettre il y a quelques jours encore, vous m'auriez dit à nouveau : mais, c'est normal, de faire tout cela ! Malheureusement, maintenant je ne peux plus travailler, je ne sers plus à rien !!!

" *Mi ne plu povas* ", m'auriez-vous dit ! Car vous ne me l'auriez pas dit en français ! *Manchmol han mer metnànder Elsassisch garèd, àwer meischtens numma Esperanto*. Je vous dirai donc au revoir et merci dans notre langue du coeur :

Kara avinjo Odette, en la nomo de ĉiuj samideanoj, kiuj vin konis kaj aprecis, kiuj ĝuis vian gastamon kaj vian afablecon, mi vin dankas pro via senlaca agademio . Ni daŭre memoros pri vi ! Vi estas ekzemplo sekvinda ! Adiaŭ, kara Odette !...



Omaĝe al Odette SCHEIDEL

Esperante ĝis fermo de l'okuloj
Agadis ridetante senĉes'
Avinjo tutnia pro neces'
Alvokis, instruis sen kalkuloj.

Frumatenoj kaj longkrepuskuloj
Ne ĝenis kapjunan. Jes !
Esperante ĝis fermo de l'okuloj
Agadis ridetante senĉes'.

Ĉiusezone sen kapituloj
Reĝino de Esperantstimuloj
Alsacen donis pli da sukces'
Al nia lingvo kun ina kares'

Al la multfaceta agado de Odette
ni ŝuldis inaŭguron
de la « *rond-point Zamenhof* »
en Betschdorf,
la 10an de juli 1999.
Oficiale ĉeestis la vilaĝestro
kaj la prezidanto
de *Esperanto France-Est*
François-Xavier GILBERT.



Dankon al nia amiksamcelano kaj subtenanto Roger DEGRELLE, kiu verkis tiun originalan omaĝon, sub formo de *rondelo*. Rondelo estas poemo je difinita formo, el-laborita je du rimoj, kaj unu refreno. Ĝi ĝenerale konsistas el dektri versoj, plej ofte ok - aŭ deksilabaj (kiel ĉi-tie), dispartigitaj en tri strofoj.

La refreno de la rondelo konsistas el la du unuaj versoj, retroveblaj fine de la dua strofo.

La strukturo de la rondelo povas tamen certagrade vari, kun unu verso plue aŭ mal-plue, ĉi-tie dekdu versoj entute.



Les nombreuses personnes qui ont l'occasion de rencontrer Odette Scheidel sont étonnées par sa vitalité, son dynamisme et sa bonne humeur.

Des contacts, elle en a dans le monde entier grâce à la langue internationale, l'espéranto, qu'elle a entrepris d'apprendre seule, par correspondance, il y a environ dix-sept ans. Elle a aujourd'hui un groupe d'élèves avec qui elle partage sa passion.

Odette est originaire de la région parisienne et s'est installée à Betschdorf en 1946. Elle habite une charmante maison alsacienne avec un jardin dont elle a fait un vrai petit paradis.


L'équipe de la bibliothèque municipale a souhaité rendre hommage à Odette, la doyenne de ses bénévoles, en organisant une exposition autour de l'espéranto. Odette est active à la bibliothèque depuis 10 ans et a même suivi la formation de la bibliothèque départementale sans hésiter à s'initier à l'informatique pour mieux servir le lecteur.

La suna reĝo, Ludoviko la 14a, faris el La Petite Pierre, militistan fortikaĵon kaj tia ĝi restis de 1675 ĝis 1870. De la 23a ĝis 25a de marto 2012, tie pace kunvenos, en la feriejo Ambroise Croizat, la esperantistaro el Orientfrancio, Germanio, Luksemburgio, Belgio, Nederlando, Svislando, sed partoprenantoj el pli foraj landoj estos ankaŭ elkore akceptataj. Jam sin anoncis klerega preleganto el Pollando kaj ĉarma kanzonisto el Italio, nu, ĉarm-kanzonisto, diras la franc-lingvanoj.

La staĝo disvolviĝos laŭ tradicia skemo, ĝi komenciĝos vendrede vespere je la 17a kaj finiĝos dimanĉe post la tagmanĝo. Ĝi entenas kursojn por komencantoj kaj komencintoj kaj prelegon por pli spertaj parolantoj. Ni piede rondiros la urbeton kaj konatiĝos kun ĉiuj lokaj vindindaĵoj: la pagana dometo, la preĝejo, la kastelo, la prisigela muzeo alzaca. Apud Lützelstein (La Petite Pierre) eblas viziti la enro-kajn loĝejojn en Graufthal kaj tute novan kaj modernan Laliqe-muzeon pri kristalaĵoj en Wingen sur Moder. La Petite Pierre, elstara turismejo en la Nordaj Vogezoj, meze de la samnoma Naturparko.

Aliĝo kaj pliaj informoj:
Bertrand WICK,
 71b, rue du Général de Gaulle
 FR-68128 Village-Neuf
 bwick@laposte.net
 Tel.+33 3 89 69 86 42 +33 9 75 69 32 93 +33 6 08 71 72 92

www.la-petite-pierre.com
www.ot-paysdelapetitepierre.com
www.vacances-petite-pierre.com



70a Regiona Staĝo de Esperanto

organizita **MULHOUSE**  **ESPERANTO** de



Por
En amikaj rilatoj kun
BAVELO

23 / 24 / 25-ajn de marto 2012
En la Feriejo Ambroise Croizat 37, rue d'Ingwiller
67290 LA PETITE PIERRE



Prelegoj de Tomasz CHMIELIK

Distra vespero
Manuel el Italio



Manuel

KURSOJ

- A: Komencantoj (débuts)**
- C: Progresantoj :**
paroliga kurso tute en esperanto.
- D: Seminario:**
Tomasz CHMIELIK el Pollando

Aliĝo kaj pliaj informoj:
Bertrand WICK, 71b, rue du Général de Gaulle,
FR-68128 Village-Neuf
bwick@laposte.net
Tel.+33 3 89 69 86 42 +33 9 75 69 32 93 +33 6 08 71 72 92

La libroservo proponos siajn 680
titolojn dum la tuta staĝo

Provizora Programo:

Vendrede 23an de MARIO 2012

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Interkonatigo
⇒ Dokument-filmo pri Esperanto
⇒ Ludoj
- 21a45 Knajpo malfermita.

Sabate 24an de marto 2012

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado tra La Petite Pierre, dum 2 horoj kaj duono, vizito al la "Pagana domo", daturigo al la malnova vilaĝo, kie troviĝas la kastelo, la malnova preĝejo, kaj la sigela muzeo de Alzaco. **Havu bonajn ŝuojn.**
- 12a Reveno al la domo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo (kun 680 titoloj)
- 14a30/18a Kursoj A, C, D Prelegaro
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 MANUEL kantos por ni !
- Poste : knajpo

Dimanĉe 25an de marto 2012

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, C, D Prelegaro
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a vizito en Wingen sur Moder al la nova kaj jam fama Laliqeu-muzeo pri vitraj artaĵoj.
- Poste : disĝo

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

Bertrand WICK
71b, rue du Général de Gaulle
68128 VILLAGE-NEUF

Ĉekoj kaj ĝiroj je la nomo de:

Bertrand WICK

Naciaj ĝiroj al **CCP 507 18 N**

STRASBOURG

Internaciaj ĝiroj al

Bertrand WICK: IBAN:

FR60 2004 1010 1500 5071 8N03 675

BIC: PSSTFRPPSTR

Por Germanio al nia peranto:

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.

(menciu la celon de via pago)

Postĝirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67)

PGA Ludwigshafen

ALIĜOJ

A: antaŭ la 1a de februaro

B: ekde la 1a

	A	B
Ĉef-aliĝanto abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	20 €	25 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilon"	35 €	40 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	15 €	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	2 €	4 €

Restado-kostoj

	1	2	3	4	6
Nombro da personoj en unu ĉambro	47 €	34 €	32 €	30 €	
1 tranokto + matenmanĝo	63 €	50 €	48 €	46 €	42 €
Duon-pensio: 1 nokto + matenmanĝo + 1 manĝo	67 €	60 €	58 €	56 €	52 €
Kompleta pensio (1 tranokto + 3 manĝoj)					
Apartaj manĝoj 16 €					

Aliĝilo por la 70a Regiona Staĝo de Esperanto en LA PETITE PIERRE la 23/24/25ajn de marto 2012

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ-kotizo	Elekta kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					
4					
Adreso					

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
Tranoktado : nombro da personoj			
Ĉambro: indiku vian preferon	1-lita 4-lita	2-lita 6-lita	3-lita

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu)

Telefono: _____ Ret-adreso: _____

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: al Bertrand WICK per ĉeko per ĝiro per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

Aktualigitaj informoj kaj aliĝilo aperos en nia retejo:
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>



APPRENDRE LA LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO du 23 au 28 AVRIL 2012 à NILVANGE (Moselle)

L'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto et Espéranto-Thionville
organisent ce 4ème stage en Lorraine, au " *Pays des Trois Frontières* "

Cours d'Espéranto pour petits et grands, présentation de films vidéos, découverte du patrimoine régional,
conférences.

Informations et inscriptions :
ESPERANTO-THIONVILLE

8 rue Pasteur

57240 NILVANGE

Tél. : 09 52 28 15 98

Courriel :

esperanto-thionville@laposte.net

Site web :

<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr>

Somera rendevuo ...



Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj
<http://osiek.org>



www.kava-pech.cz/iek

Internacia Esperanto-Konferenco 2012

kun pritraktota temo:

SCIENCFIKCIO KAJ ROBOTAJ

Svitavy (CZ), 2012-07-14/20

KONTAKTO, porjunula revuo de TEJO
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Kvankam mi ne plu junulas, mi ŝatus informi nian legantaron junulan kaj malpli junulan pri la kvalito
aspekta kaj enhava de la nova versio de la porjunula revuo KONTAKTO, sub ĉefredaktoreco de Rogener
PAVINSKI.

Aboninda revuo !

Edmond LUDWIG

LA 19-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO EN MALGRAT DE MAR, de la 1a ĝis la 8a de oktobro 2011



La tradicia E-Semajno okazas ĉiujare aŭtune en Hispanio. Katalunaj esperantistoj aranĝas ĝin. Ni restadis en la hotelo "Cartago Nova", kie renkontiĝis 130 esperantistoj. Amase venis hispanoj, francoj kaj belgoj. Entute venis personoj el 12 naciecoj, inter kiuj pluraj novuloj. La vetero tiutempe estas varma, do tiele oni plilongigas la someron kaj ĝuas agrablan restadon inter geamikoj. Malgrat de Mar situas proksimume 60 km nordoriente de Barcelono. Ĝi estas ĉefe turisma urbo, havanta ĉirkaŭ 20 000 enloĝantojn, kiuj dum somero triobliĝas pro alveno de turistoj. Dum la vintro multaj hoteloj ne funkcias. La Semajno komenciĝis sabate la 1-an de oktobro. Dimanĉe okazis malfermo kun ĉeesto de la reprezentantino de kulturo kaj la urbestro de Malgrat de Mar s-ino Conxita Campoy i Martí. Post la parolado de la ĉefa organizanto Luis Serrano Pérez ŝi bonvenigis nin kaj esprimis favoran sintenon al Esperanto. Danke ŝi ricevis memoraĵon pri nia aranĝo kaj plurajn librojn, inter kiuj la fama "Don Kihoto". De la urbo ĉiuj ricevis ĉapelon kaj dorsosaketon, kiujn ni utili-



Inaŭguro kun reprezentanto de la urbestro de Malgrat de Mar

gis ĉefe dum la ekskursoj. Komuna fotado okazis antaŭ la hotelo, sur kies barilo pendis banderolo anoncanta nian aranĝon. Do, ĉiuj preterpasantoj eksciis pri ekzisto de Esperanto. Tiutempe ankoraŭ estis amaso da turistoj, kiuj ĝuis belan sezonon ĉe la marbordo.

Dum la semajno okazis pluraj allogaj prelegoj, debatoj, diskutoj. Libieran tempon iuj profitis piedpromenante aŭ per turisma trajneto, aliaj naĝis en la hotela naĝejo aŭ en la maro. E-kurson gvidis Stano Marček. Li prezentis al intereso sian vastan pedagogian materialon kaj poste instruis laŭ ĝi. La du interkonaj vesperoj okazis en gaja etoso.

Partoprenantoj de la internacia semajno





Monumento de Zamenhof en Sabadell

Oni trinkis Esperanto-ĉampanon, spertuloj dolĉan vinon el specialaj ujoj nomataj "bota" kaj "porron". Ne mankis frandaĵoj. Ĉiu bone amuziĝis kaj babilis.

Per bildoj ni havis okazon konatiĝi kun Rumanio kaj Laoso. Pri Rumanio rakontis Rodica Todor (vestita en bela nacia kostumo), kiu loĝas en Braŝovo. Pri Laoso donis informojn Rémy Bouchet el Francio. Li konatiĝis kun la lando dum sia vojaĝo. La geedzoj el Belgio Michéle kaj Hubert rakontis pri sia sperto vojaĝante al la 90-a UK en Vilno. Ili ankaŭ montris interesajn bildojn pri la naturo kaj pri renkontoj kun esperantistoj. José Año Belda organizis kaj prizorgis intervjuon de radio al kelkaj partoprenantoj. La intervjuo estis rekte disaŭdigita, ĝi okazis telefone.

Serio da prelegoj temis pri: "La arto de la branĉo-tondado", "La giganta laboro de Monda Asembleo Socia" (MAS), "Kiel nomas la sciencistoj la vivaĵojn?", "La belga kompromiso", "E-civito kaj la E-kulturo". En tiu-ĉi aranĝo estas kutimo atribui premion al elstara esperantisto. Ĉi-foje ĝi estis aljuĝita al franciĝinta hungaro Eugene Zilah. Vigla debato ekestis pri la demando "Ĉu Esperanto estas artefarita lingvo?" Por ŝatantoj de opero Maria Ferigle prezentis sur DVD operon "Turandot".

Okazis du duontagaj ekskursoj. Ni vizitis la urbon Viladrau kaj ties akvomuzeon.

Dum la dua ekskurso traveturante la urbon Caldes de Malavella ni vidis hotelrestadejon "Vichy" kun varmoterapio. En apuda fabriko oni enboteligas mineralan akvon. En la entrepreno de biskvitoj Trias, kiu troviĝas en la urbo Sta. Coloma de Farnés ni trarigardis muzeon, spektis filmon pri la historia evoluo de la fabrikado kaj pri ĝiaj posedantoj. Fine ni gustumis tri specojn da biskvitoj. Nerezistebla estis aĉetado. La urbo Sabadell estis la celo de la tuttaga ekskurso. Unue ni vizitis Paleontologian muzeon. Malantaŭ la pordo de la enirejo atendis nin fantazia prahomo en Adam-vesto (sen la folio), kiu ŝokis kelkajn, sed aliaj atente observis lin. Ni konatiĝis kun la paleontologia esplorado ekde la eltrovo, studado kaj publikado. Ni vidis plurajn fosiliajn eltrovaĵojn kaj laboratorion, kie oni preparis ilin. Poste ni piedmarŝis tra la



Ĉe la paleontologia muzeo

strato Zamenhof ĝis la monumento de Zamenhof, kien ni metis florbukedon kaj fotiĝis. Sekvis pikniko ĉe bela parko kaj vizito de la subĉiela artmuzeo en "Pedregar".

En Malgrat okazis la 12-a Internacia festivalo de muzikbandoj. Jaŭde matene ni spektis ilian paradon tra la promenejo. Ili ekis de nia hotelo kaj poste koncertis en la urbocentro. Venis muzikantoj el Svislando, Italio, Pollando, Germanio, Nederlando kaj tri malsamaj bandoj el Ĉeĥio. Fine de la tago ni ĝuis la tradician folkloran vesperon


kun la ensemblo "Els Rogels". La muzikistoj regalis nin per bela havana muziko kaj kantoj, kiuj inspiris iujn al dancado. Al bona etoso kontribuis trinkado de jam ankaŭ tradicia bongusta specialaĵo "Cremat"-bruligita rumo kun spicaĵoj. Ĉiu ricevis memoraĵe ujeton, en kiun ĝi estis verŝita. Dum la lasta vespero oni pritraktis funkciadon de la E-Semajno kaj la sekvan tagon ĉiuj disiĝis al siaj hejmoj. Ni ĝojatendas la venontjaran renkonton por festi la 20-an jubileon



Preparado de "Cremat"

Liba Gabalda

Rémy Bouchet pri Laoso




Rodica Todor pri Rumanio

La ensemblo "Els Rogels"



... malkovri *Lublin* ? Sekvu min !

Infero, laŭdire, estas pavumita de bonaj intencoj. Kaj internaciaj vojoj estas surveturigitaj de esperantistoj devigataj, konstante vojaĝi, pro esperanto sed ofte nek por esperanto, nek per esperanto.



Antaŭ 30 jaroj, mi eklernis la lingvon kiel faligilon de babelturo, kaj post konsenkvenca esperantista geedziĝo, mi ofte devis veturi Pollanden ne por esperantumi sed por bofamiliumi !

Ĉu almenaŭ nia filino *Mélanie*, pura esperantidino, feliĉe kaj sirene naĝas en la verda oceano? Tute ne ! La lingvo ne allogis ŝin: ŝi preferis resti surtere kaj lerni, unu post la alia, la ĉefajn lingvojn de nia kontinento, cetere kun ia sukceso. Kaj la patro denove aliformiĝis al migranta judo por ŝofori aŭ alporti necesajojn al filino studanta eksterlande sub auspicoj de sinjoro *Erasmus*, lastjare en *Bochum* (Germanio), ĉijare en *Lublin* (Pollando)

Sed kial *Mélanie* elektis restadi plurajn monatojn en Lublino ? Unue ĉar la polan ŝi studas en fakultato de du jaroj. Due ĉar Lublin estas urbo ĝemelita kun Nancio ; kaj pro interurba kontrakto, ŝi povis jam restadi aŭguste tie por staĝo en la urbodomo. Trie ĉar Lublin estas universitata urbo, kie alvenas multe da studentoj, ankaŭ eksterlandanoj.

Ĝemela urbo, studentejo, Pollando: kiel esperantisto ne havus emon iom verdigi la menuon?

Jam plurajn semajnojn antaŭe, mi konsultis la jarlibron kaj trovis unu adreson, ne retan. Mi uzis tradician leteron (mi ankoraŭ scias kiel fari...). Sen respondo unu semajnon antaŭ foriro, mi decidis provi telefonalkvokon, sed respondilo pola-angla dubigis min pri la valideco de la adreso. Eble esperanto kolapsis en Lublino?

Tiam bonŝance, mi iel atingis la retejon esperantoland.org, kaj tiel malkovris, ke ja pluvivas esperanto-grupo en Lublin, ke ĝi kunvenas ĉiun lundon, kaj ke ĝi havas sekretaron nomiĝanta *Stanislaw Pilat*. Mi tuj sendis retmesaĝon kaj ricevis preskaŭ tuj respondon kun retadresoj de 3 aliaj gesamideanoj: profesoro *Witold Stepniewski*, *Anna Laskowska* kaj *Stanislaw Rybicki*.



Post aktiva retkorespondado ekstaris lastmomente internacia programo.

Kaj mi ekveturis jaŭdon 10an de oktobre, tagmeze. Sola, ĉar mia edzino, ĵus trovinte laboron ne povis akompani min. Veturado estis longa (1500 km). Provo de loĝado en *Wroclaw* pere de pasporta servo fiaskis. Malgraŭ incito de mia familio al dormado en hotelo, mi preferis halti nur kelkajn horojn sur germana aŭtoŝosea haltejo. Mi atingis Pollandon iom antaŭ tagiĝo kaj kunplezure pensis, ke baldaŭ aŭtolampoj ĉesos lacigi miajn okulojn, Mi bedaŭrinde rapide ekkomprenis, ke nun, en Pollando, la lampoj estas devigaj, eĉ dumtage!



Post rapida uzado de bona aŭtoŝoseo ĝis *Wroclaw*, mi devis komenci veturadon sur duvoja ŝoseo. Tiam revenis al memoro la unuaj vojaĝoj al Varsovio, kiam Polando estis ankoraŭ komunista lando. Tiam sur la duvoja ĉefa vojo de Berlino al Varsovio ĉefe veturis etaj fiatoj kaj ne malmultaj ĉevalĉaretoj. Sed veturado estis facila ĉar nanaj aŭtoj kaj ĉevaloj mem decidis uzi flankan vojaron por lasi la vojaron libera al rapidaj veturiloj.

Nun amasas niatempaj veturiloj kaj kamionoj el ĉiuj landoj. Sed kontraste al la miriga transformiĝo kaj modernigo de la lando, multaj vojoj restas malbonkvalitaj. En la multaj trapasendaj vilaĝoj fungis la paneloj anoncanta radarojn ; sed vidinte, ke nur mi respektis la rapidlimojn, mi suspektis, ke la monpunoj ankoraŭ ne tiel aŭtomatas kiel en Francio. Ĝuu, polaj amikoj! Tio verŝajne ne daŭros eterne!

Dum tiu longa veturado, mi spertis la utilecon de modernaj iloj. La persatelita gvidado utilis al mi ĝis la pola landlimo sed pro manko de orienteŭropa karto ne povis ŝparigi kelkajn dekojn da minutoj pro vojeraroj. Kaj la portebla telefonilo ĝenerale ne uzata (de mi) permesis sendon de mesaĝoj por anonci mian lokalizon al mia filino. Post limaka veturado, je la 15a, mi finfine atingis Lublinon, kie *Mélanie* atendis min en la studenta rezidejo, kie ŝi nun loĝas,

Post ĝoja troviĝo, ni iris al mia hotelo por lasi bagaĝoj, kaj ekiris por ekviziti la malnovan urbon. Mia persona gvidistino kaj tradukistino, dum aŭgusta staĝo, fakiĝis pri la urbo pro tradukado franclingven de turisma prospekto pri Lublin, Ŝi ekmontis interesajojn: la kastelo sur aparta monteto kaj la mezepokan urbon, nuntempe rebeligata.

Baldaŭ noktiĝis: ni vespermanĝis en agrabla restoracio, kie Mélanie ĉiutage manĝis dum aŭgusto. Mia filino atentigis pri la seriozeco de kartmanĝoj. Prave : deserta pastkuko por unu persono konsistis el kvar pecoj, kiujn duope ni ne sukcesis tute manĝi surloke!

Sabaton matene ni iom trairis la urbon, poŝtkartumis kaj vizitis la turisman oficejon. Je la 13a, ni havis rendezuon kun profesoro Witold Stepniewski, vic-rektoro de la teknika universitato de Lublin, kiu afable akceptis nin en sia oficejo, Tre interesa konversacio sekvis kaj daŭris en la universitata restoracio, kie li invitis nin. Bedaŭrinde prof. Stepniewski havis tre densan programon: ekzameno je la 15a, veturado al Varsovio dimanĉon kaj forflugo al Ĉinio sekvontan lundon.

Posttagmeze ni iom magazenis por trovi nutraĵojn kaj donacon por la ĵus naskita bebo de mia pola nevino. Ni trovis alian agrablan restoracion en la malnova urbo kun bongusta manĝaĵo.

Dimanĉo estis dediĉita ne al esperanto sed al vizito de mia bofamilio en Varsovio, kiu distancas nur je 150 km. Veturado ne estis tro longa kaj ni ne perdis tro da tempo por retrovi la loĝejon de mia bopatrino malgraŭ manko de mapo kaj persatelita gvidado. Post mallonga vagado en la suda parto de la grandiganta ĉefurbo, Mélanie sukcesis orientiĝi kaj ni alvenis al ŝia "Babĉjo" (avinjo) je la 13a.



Post salutado kaj donado de floroj kaj donacoj, ni tuj ekmanĝis bonan kuiritaĵon. Ni decidis iri poste per tramo al bofrata familio. Tie je la 15a, ni ekkonis la sesmonatan bebon, donacis kaj estis invititaj kunmanĝi salitajn kaj sukeritajn manĝetaĵojn. Ni babilis, Mélanie tradukis. Pasis la 16a, familianoj invitis nin manĝi (ĉu tag-aŭ-vesper, mi ne bone komprenis!). Alvenis novaj pladoj: ni honoris. Poste, bofratino proponis al mi plu manĝi! Tiam unuafaje, eksterlande, mi kapitulaciis antaŭ troa manĝoferto!

Reveturado al Lublin fariĝis senprobleme.

Dimanĉo estis grava tago por renkontiĝo kun lokaj geesperantistoj. Matene venis al mia hotelo Anna Luskowska kaj Stanisław Rybicki. Ni retrovis Mélanie kaj kune revizitis detale la urbon.

Lublin multe similas al Nancio: 400 000 loĝantoj, iom pli ol la nancia urbaro, inter ili 100 000 studentoj. Kiel mia urbo, Lublin

naskiĝis mezepoke, kaj grandiĝis proksime de kastelo. Eta diferenco: sur la ĉefa placo de Nancio estas statuo de pola reĝo; en Lublino, mi ne vidis...

El la monteto de la kastelo (kiun ni ne povas viziti lunde), ponto atingas la monteton de la malnova urbo alirebla per malnova pordego. Inter la du montetoj iam kuŝis la juda kvartalo Pro la nazia furiozeco, vaporiĝis ties domoj, kaj 40.000 el la 100.000 tiamaj Lublinanoj nun fantomas sur la nove konstruita placo kaj sur nuda herbejo.

Promenado ekis tra la agrablaj stratoj de la malnova urbo, kie indas rigardi fasadojn de domoj iom post iom refaritajn, la iaman reĝan tribunalon, statuon de kaprino, kiu simbolas la urbon, restaĵon de la unua preĝejo... En la tre katolika Pollando, nepris kompreneble vizitis ĉiujn preĝejojn. Ilia internaĵo estas ĉiam bele ornamita: vitraloj, orumitaj statuoj, orgenoj... En unu, ni povis viziti trezorejon, kie oni konservas valorajn objektojn: luksaj kultaj objektoj, riĉaj pastraj vestoj. Tiujn artaĵojn oni sukcesis efike kaŝi dum la lasta mondmilito. Ankaŭ kriptojn ni vizitis.

Ni malkovris poste pli novajn kvartalojn kaj interalie promenejon kun belaj akvosprucejoj, statuo de marŝalo *Pilsulski*, liberanto de Pollando en 1918, kaj monumenton pri iama ligo inter Litovio kaj Pollando. Antaŭ la urbodomo ni vidis ĉe muro tabuletojn kun la nomoj de la 20 ĝemelaj urboj de Lublino kun dato de kontrakto. Nancio estis la unua!



Post manĝado en nia kutima restoracio, Stanisław devis forlasi nin. Anna restis ankoraŭ kelkatempe kun ni kaj ni plubabilis kelkatempe. Venis por ŝi tempo reiri al ŝia urbo distanca je 50 km. Ni kunesperis daŭran kontakton inter niaj grupoj.

Memore al ...

LA TRIBUNE DE GENEVE - (17/12/2011)

Peu de Lémaniques savent qu'un des plus grands romanciers en espéranto a vécu de nombreuses années, à *Gland*, parmi eux. **Claude Piron** a eu une trajectoire peu commune, qui l'a fait passer des cabines d'interprétation des Nations-Unies à la faculté de psychologie de l'Université de Genève où il a donné plusieurs années de cours.



Truculent petit personnage, jamais avare d'une anecdote glanée en Chine, en Amérique du Sud ou en Belgique, il s'est fait connaître pour ses romans policiers et ses nouvelles, dans lesquelles il use et abuse avec délectation des mille et une possibilités poétiques de la langue de Zamenhof.

En bon universitaire, il a également publié quantité d'études scientifiques démontrant avec rigueur les avantages de l'espéranto sur les plans économique, social, diplomatique, psychologique. En vulgarisateur hors pair, il a réuni le fruit de ses réflexions dans un ouvrage très abouti: *Le défi des langues* (L'Harmattan, 1994).

Dans *la bona lingvo (Pro Esperanto, 1989)* il s'adresse au lectorat espérantophone, de façon très simple, pour faire le bilan des raisons pour lesquelles il y a lieu de qualifier cette langue de "bonne". Ainsi, il parvient à faire approcher le génie d'une langue à ses locuteurs au quotidien, qui en profitent, en jouissent parfois, sans en saisir les mécanismes psychologiques:

Comment se fait-il que tous les locuteurs de l'espéranto trouvent la même tournure plus élégante qu'une autre, quand bien même elle est souvent plus éloignée de leur langue d'origine ? Comment se fait-il que nous créons spontanément des mots en espéranto, que nous serions bien incapables de traduire dans notre langue maternelle ?

Comment se fait-il que l'intuition soit plus efficace que la rigueur et le bachotage pour bien s'exprimer en espéranto ? Décidément, il n'y a pas de mauvaises raisons de consacrer quelques heures à apprendre cette langue !

=====

... Ĉu enretigi "La Informilo-n" ? ...

Reage al peto de UFE, kiu proponas paralelan eldonadon de nia bulteno per la reto -kompreneble "... Nur pozitivaj rezultoj por antaŭenigo de nia afero !..." laŭ la nacia asocio !- okazis debato sine de la komitato de *Esperanto France -Est* pri adoptinda sinteno ...

Ni taksas pli ol interesiga, opinion de unu el la komitatanoj ...




"...Ĉu estas pli bone legi *La Informilon* laŭ papera aŭ ekrana prezento ?... Mi devas diri, ke mi iom laciĝas pri la troa informatikado ... Pri tuttaga rigardado (profesia, asocia, privata) al ekranoj, kiu finfine detruas la okulojn, pri komputiloj, kiuj bezonas dek minutojn por ekfunkcii, kiuj paneas, detruas sian propran memoron, pri spamoj, kiuj plenigas la kestojn, pri la atendataj mesaĝoj, kiuj rubujenas, pri lavango da "aldonitaĵoj", pri malfacileco printi paĝojn per printiloj, kiuj postulas multekostegajn

inkujojn ! ? ! ...

Kiel agrable kaj trankvile foliumi *La Informilon* sur ripozseĝo en la ĝardeno !!! "

J-L Th.

NB – el la redaktejo : iom da analogio ... Ĉar invado, eĉ ne plu insida, de la angla-usona idiomo, rezultigas iom post iom malaperon de vivantaj lingvoj, tutsame, invado de per-reta informado rezultigas iom post iom gravajn malfacilaĵojn por multaj gazetoj kaj magazinoj, kiuj penas postvivi ...



En la "*Kleriga Lundo*" de la *Kopenhaga UK*, Paul Gubbins, la ĉefredaktoro de *Monato*, donis lecionon pri la arto verki gazet-artikolon. Temis pri interaktiva leciono, ĉar anstataŭ prelegi, Gubbins diskutigis la aŭskultantojn, por ke ili mem eltrovu la trajtojn de bona artikolo.

La programero estis filmita por la *Reta Kinejo* de UEA. Oni oni povas nun vidi ĝin, ĉu kiel unu kontin-uan filmon (58 min.), ĉu en kvar ĉ. 15-minutaj partoj. Oni iru al la suba adreso por elekti:

<http://vimeo.com/album/1743043>

Zamenhof-festo en Weil-am-Rhein 10an de decembro 2011

La Esperanto-grupo de Bazelo organizis ĉi-jare la Zamenhof-feston en *Weil-am-Rhein*. Estis invititaj samideanoj el la grupoj de *Frajburgo*, de *Mulhouse* kaj *Colmar* kaj aliaj lokoj.

Ĝi komenciĝis per vizito al tre moderna arĥitektura konstruaĵo, nome "*Vitra Dom-Piramido*" en Weil-am-Rhein, kiu konsistas el 5 domoj iel surmetitaj. Interne troviĝas tre modernstilaj mebloj, ĉefe seĝoj, foteloj, kanapoj: la produktoj de la mecena entrepreno *Vitra-Design*. Ĉi-supre aperas du horloĝoj je formoj de okuloj.

Post la vizito ĉiuj retroviĝis en ĉina restoracio, kie la bazela grupo akceptis nin per kafo kaj kukoj.

Poste okazis kelkaj prelegoj pri diversaj temoj.

Nicole Bérout klarigis pri IBA, vastaj konstruprojektoj en la trilanda regiono Svislando, Germanio kaj Francio. Fernando parolis al ni pri projektoj en Colmar rilate al Afriko, kaj Roberto rakontis pri siaj propraj spertoj en lasta UK en Kopenhago. Ĉi-sube la projekto de Fernando.

Colmar kaj Afriko

Saluton, karaj geamikoj!

Hodiaŭ estas por mi granda tago, ĉar mi festas Zamenhof-feston, sed ankaŭ mian naskiĝrevendaton. La 10an de Decembro 1955 en la vilaĝo *Kisoba Nanga*, komunumo de Damba, provinco de *Uige* en Angolo, naskiĝis iu knabeto, kies nomo iĝis Fernando.

Mi tre ĝojas hodiaŭ festi kun miaj gesamideanoj el 3 landlirregionoj de la plej grandaj landoj de Eŭropo: samideanoj el Mulhouse (Francio), Bazelo (Svislando) kaj Frejburgo (Germanio). Ankaŭ bone finiĝas la jaro 2011, kiu estis la "Eŭropa Solidara Jaro".

Mi estas s-ro Fernando el Angolo, jam antaŭ unu jaro mi alvenis en Colmar, kie mi loĝas ĝis nun. Estante esperantisto, mi jam partoprenis en multaj esperanto-renkontiĝoj en Mulhouse, Strasbourg kaj Villingen en Germanio, dufoje mi vizitis la sidejon de Esperanto-France kaj SAT-amikaro en Parizo, mi partoprenis al la estrarkunvenon de TAKE-Esperanto « La konstruistoj », kie mi fariĝis membro por la jaro 2012. Kun s-ino Simona Lutwiller ni prezentis esperantan artikolon en la ĵurnalo DNA (09/11/2011) kaj partoprenis la festivalon <<Engagement Solidaire>>, kiu okazis en Strasbourg kaj ni

ricevis preskaŭ 70 subskribojn por la peticio « *Espéranto au Bac* » kaj hieraŭ mi partoprenis en tiu-ĉi granda evento por ni esperantistoj: la Zamenhoffesto. Kiel Afrikano mi estas membro de 2 afrikaj asocioj: CHARITE AFRICAINE DE COLMAR (CaC) kaj Euro-Afrika Solidereco. La unua prezentas la afrikajn kulturojn ĉe eŭropanoj (ni jam partoprenis la kvartalan feston de Bel-air en Colmar kaj ni ekspoziciis pri la afrikaj statutoj, vestaĵoj, dancoj kaj esperantaĵoj. La dua asocio klopodas por disvolvigi aŭ evoluigi Afrikon, ankaŭ lukti kontraŭ la malriĉeco de afrikanoj kaj ilia enmigrado en Eŭropon, ĉar se ili bone vi vas en sia lando, mi ne kredas, ke ili volas enmigri Eŭropon. Do ni devas solidariĝi inter ni, Eŭropanoj kaj Afrikanoj,

Por ke ni sukcesu, ĉar iu afrika proverbo diras en la lingala lingvo: "*Soki olingi kokende mbangu, kende yo moko, kasi soki olingi kokende mosika kende na baminga*" en kikongo "Ana zolele kuenda tinu, wenda nge mosi, nkansi ana zolele kuenda kwa nda, wenda ye mpangi yaku" En Esperanto: "*Se vi volas iri rapide, iru sola, sed se vi volas iri for malproksimen, iru ambaŭ kun via (j) amiko (j)*". Mi profitas tiun-ĉi okazon por prezenti al vi kelkajn projektojn, kiujn ni intencas organizi por la jaro 2012 kaj 2014.

- Unue mi preparos lingvofestivalon: « FESTIVAL AFRO - ESPERANTOPHONE » en COLMAR, en Septembro 2012, okaze de la 125-jariĝo de ESPERANTO. Ni prezentos la afrikajn, alzacan kaj esperantan lingvojn.

- Dua projekto pri Afriko: Kiel enkonduki Esperanton en afrikajn lernejojn per la pedagogio de Caleb Gattegno kaj kiel instrui la afrikanojn per iliaj lokaj kaj naciaj lingvoj per la sama pedagogio, ĉar ĝi estas universala metodo.

- Tria projekto estas la agrikultura, ĉar ni ankoraŭ ne sukcesas satigi la malsatulojn; ni ankaŭ plantos arbojn por bonigi la klimaton.

- Kvara projekto: En la jaro 2014 ni intencas organizi turisman vojaĝon de Alzaco al Afriko. Ni jam parolis kun s-ro Sébastien Essou de SANDOTOUR, la esperantisto el Benino, kiu partoprenis la internacian foiron pri turismo kaj vojaĝoj en Colmar.

Do, mi dankas ĉiujn, kiuj ĉeestis la Zamenhoffeston kaj kiuj sendis al mi mesaĝon kaj pakajojn por deziri al mi bonan novjaron. Reciproke mi ankaŭ bondeziras al ili.

Korbrakume al ĉiuj esperantistoj tra la mondo!

Fernando



Stereofonia deĵorado!...



Ĉu ne signo de dinamiko ?

Dum la semajnfino de la 19/20-aj de Novembro, du interesaj regionaj foiroj okazis apud Mulhouse : "*Bédéciné*" (vaste reklamata bildstria festivalo), kaj foiro pri "*ekologia kaj justa komercado*" en Ungersheim.

Dividiĝis la skipo helpata de esperantistoj el *Village-Neuf* kaj *Stoss-wihr*... kaj deĵoris en ambaŭ budoj.

Nova okazo por reklami kaj rikolti subskribojn por la peticio :

www.esperanto-au-bac.fr

Deĵoras Bertrand WCK

... kanti en esperanto ! ...

Bedaŭrinde ne plu funkcias la Esperanto-kurso en la universitato de Haute-Alsace en Mulhouse, kiel cetere aliaj sekcioj, pro buĝetaj ŝparoj. Sed daŭre mi estas invitata al la poeziaj vesperoj diverslingvaj, kie ankaŭ enpartoprenas membro de la profesia alzaca musikgrupo *GERANIUMS*.



Jam nia samideano *Jacques PINEDA* de *Mulhouse-Esperanto* proponis al ili ludi kaj kanti kanzonojn en Esperanto. Kion ili nun faras, kaj dum la novembra poezia vespero organizita de la dekanato de la Fakultato pri Belreto, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj, kiu daŭre fervore subtenas Esperanton, la estro, *Daniel MURINGER*, kantis enkonduke de la vespero la ciganan kanton « *da nu da nai* » kun perfekta prononco. Li akompanis sin per bandoneo. Ĉu pliaj sekvos ?

Pri la grupo vi povas legi en

http://www.geranium-alsace.com/geranium_historique.htm

Edmond LUDWIG

L'Espéranto, une clé vers les autres cultures

Le *Mix'Cité* et l'association *Espéranto 10* proposent tout le mois des ateliers et des cours.

Troyes - JUSQU'AU 31 OCTOBRE



Il y pensait depuis un moment. Il lui aura suffi d'une rencontre pour que les choses se concrétisent. "*J'avais envie de développer le côté culturel des lieux, confie Claude Amiot, patron du Mix'Cité, j'avais envie d'associer le bar avec des choses nouvelles pour lui donner une autre image, en faisant découvrir ainsi aux clients ce qu'ils n'iraient pas forcément voir tels que des concerts, des soirées slam ou des expositions*". Quoi de mieux que l'Espéranto, langue universelle, symbole de mixité par excellence, pouvait être à l'honneur de cette première soirée.

Depuis le 1er octobre, les cimaises du café accueillent une exposition consacrée à l'Espéranto.

"*Cela fait longtemps que je cherchais un lieu où on pourrait animer des ateliers et présenter nos activités*", se réjouit *Michèle Guingouin*, présidente de l'association *Espéranto 10*.

Désireuse de faire connaître cette langue, elle a bien compris qu'il "*fallait aller vers le public*". Jusqu'à la fin du mois, la structure, créée en 1979 et forte d'une cinquantaine d'adhérents, a fait le choix de délocaliser ses cours et de les ouvrir à tous ceux qui le souhaite, afin de "*faire connaître l'Espéranto, cette clé vers le monde et les autres cultures*".

Troisième langue la plus utilisée sur le net, l'Espéranto est "sept fois plus facile que l'anglais et accessible à un maximum de personnes. Il y a seize règles. Toutes les lettres se prononcent. Cela n'empêche pas pour autant la finesse du langage".

- Exposition sur l'Espéranto jusqu'au 31 octobre au *Mix'Cité*, rue de la Cité à Troyes. *Entrée libre.*

L'EST ECLAIR - 13 octobre 2011

Aleksander Melnikov en Vogrezoj ===== ★

La aranĝo de mardo (29-11-2011) en la teknika privata lernejo de *Saulxures MFR* bone pasis; deko da gelernantoj elektis aŭskulti la preleganton *Aleksander Melnikov* kaj rigardi liajn fotojn, kaj seso da plenkreskuloj kuniĝis. Li mem estis tre interesa, ofte pesimisma pri la nuna situacio en Rusujo, sed ĉiuj atente aŭskultis.

Surprizo venis dum la prezento. Viro en la publiko subite komencis paroli ruse al Aleksander, kiu respondis ruse, kaj la interparolo ŝajnis facile flui. Mi estis en granda admiro konstatante, ke ni havas talentan rusparolanton en Saulxures, kiu plie enamiĝis al Rusujo, kien li jam vojaĝis plurfoje ! Li ĉeestas kursojn en *Epinal* de du jaroj.

Kelkaj ĉeestantoj ankaŭ sukcesis iom paroli angle kun nia gasto, sed la plej granda parto de la prelego estis en esperanto, tradukita francen fare de mi. Entute, kun la franca, esperanta, rusa kaj angla, ni uzis 4 lingvojn !

(Ni forgesis foti la asembleon. Mi revenis la morgaŭan tagon por redoni la ŝlosilon, kaj simpatiaj junulinoj dum la paŭzo volonte akceptis esti fotitaj apud Aleksander**. Ili ne multe sciis pri *Staline*, *Karl Marks*, aŭ kie troviĝas la *Nigra Maro*; sed certe la simpatio al Aleksander venis pro lia simpla aspekto de bonvola homo).

La merkredo (30-11-2011) ankaŭ bone pasis kun nia vizitanto. En la kultur-domo de *Gérardmer*, li estis pli serena kaj pli amuza, sen kaŝi la rusajn problemojn. Venis proksimume 18 personoj, inter ili 12 esperanto-parolantoj.

Nur unu persono povis paroli kelkajn vortojn en la rusa, sed ŝi ne aŭdacis fari. La asembleo estis preskaŭ tute esperanta kaj la etoso tre amika. Ni finis la renkonton per komuna manĝo de diversaj kukoj faritaj de la lokaj esperantistoj. Tiuj du tagoj estis tre, tre plenaj, kaj mi donis multe el mia energio...

Mi ankaŭ parolis kun Alexander de matene ĝis vespere en mia hejmo, ĉar li estas tre babilema. Mi eksciis, ke li aktuale instruas la anglan lingon en la universitato de *Rostov-ĉe-Dono*, ke la studentoj estas en tre malalta nivelo, ĉar ili ofte akiris diplomon per donaco de kaŝmono al la antaŭaj instruantoj, ili lernas per malnovaj libroj faritaj en Rusujo, kiuj enhavas erarojn. La profesoroj ne rajtas elekti pli taŭgajn librojn, kaj aliflanke la plej modernaj libroj estas tro kostaj. La profesoroj estas maljunaj, la mizera salajro ne allogas junajn instruantojn...

Mi komprenas, kial li estis iom serioza, kaj ne havas multe da espero pri ŝanĝo de situacio en sia lando.

** vidu rubrikon *el nia fototeko*

Ginette MARTIN

kalejdoskopio

... nous l'avons échappé belle ! ...


Lors d'un entretien avec *Rudolf Hess*, le successeur désigné d'Hitler, le journaliste suisse Hans Unger avait noté ces paroles ...

"L'espéranto est une salade linguistique absolument inacceptable issue d'un cerveau juif; mais ce n'est pas le seul obstacle, du moins à mon point de vue. L'Allemagne est une grande puissance, et ses idées, où son idéologie, vainquent peu à peu le monde entier — au moins l'Europe. C'est sans doute NOUS, et notre Führer, non point les fantaisistes, qui organiserons ce continent, qui créerons la "*Panurope*", cet état fédéral européen auquel ont vainement rêvé les générations passées...

Naturellement, nous devons alors avoir une langue pour toute l'Europe. *Ce sera l'allemand !* Des linguistes allemands ont déjà créé une langue simplifiée que nous avons baptisée "*Weltdeutsch*"***. Nous n'avons pas besoin de la salade linguistique artificielle mélangée par un juif polonais, car nous avons une charmante langue naturelle dont la vie et l'évolution sont garanties par le vigoureux peuple allemand. L'espéranto est un dangereux jouet de fantaisistes. Et puisque nous vivons la vie réelle, nous devons le combattre par tous les moyens, pour qu'il ne tourmente pas les têtes."

